# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (907) • 2014 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



Vidindaĵoj de Cadine, Trento kie en aŭgusto ĉi-somere okazis la Ekumena Esperanto Kongreso.

(vidu paĝon 83)





**KELI**

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420311241406;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**



**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ



Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Ĉu la eklezio estas dividita | 75 |
| Memorigo al la komenciĝo de la unua mondmilito | 78 |
| Batante Jesuon | 80 |
| Reago de leganto | 82 |
| Kongresa raporto | 83 |
| Protokolo de al jarkunveno | 90 |
| Klostro Kirchberg | 92 |
| Informetoj | 93 |
| Nekrologoj | 94 |
| En la komenc' de ĉi tiu nova tag' | 96 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Ĉu vi havis eblecon partopreni iun esperantan renkontiĝon somere? Pro la komenciĝo de la nova lerneja jaro de mia filo, mi mem ne povis partopreni. La lastajn jarojn mi feliĉe havis la eblecon kongresi. Legante la raporton de la ekumena kongreso en tiu-ĉi gazeto mi sentis iom da manksento ĉar mi sentas min parto de nia granda familio kiu renkontiĝas (nur) unu-foje jare.

Kutime post esperantaj renkontiĝoj mi estas instigata plu studi kaj pli bone lerni nian lingvon. Kvankam mi ĉi-jare ne partoprenis iun renkontiĝon mi defios min mem aliĝinte al la esperantaj postdiplomaj studoj en Poznan. Espereble mi trovos kaj tempon kaj forton tralabori la kursojn.

Ĉu vi havas ion raporti post la somero? Mi volonte akceptos kontribuojn.

Krom la raporto kun multaj fotoj, vi ankaŭ trovos aliajn kontribuojn de diversaj membroj. Mi esperas al vi interesan legadon.

# Ĉu la Eklezio estas dividita

Prediko dum la ekumena kongreso, Cadine, Trento, 21 aŭgusto 2014

Philippe COUSSON, FR

Efesanoj 4:1-7

*Mi do, malliberulo pro la Sinjoro, petegas vin, ke vi iradu inde je la voko, en kiu vi estas vokitaj, 2 kun ĉia humileco kaj mildeco, kun toleremeco, paciencante unu al alia en amo, 3 penante konservi la unuecon de la Spirito en la ligilo de paco. 4 Estas unu korpo, kaj unu Spirito, kiel ankaŭ vi estas vokitaj en unu espero de via voko; 5 unu Sinjoro, unu fido, unu bapto, 6 unu Dio kaj Patro de ĉiuj, kiu estas super ĉiuj, kaj tra ĉiuj, kaj en ĉiuj. 7 Sed al ĉiu el ni la graco estas donita, laŭ la mezuro de la dono de Kristo.*

Efesanoj 4:11-16

*Kaj unujn li donis por esti apostoloj; aliajn, profetoj; aliajn, evangeliistoj; kaj aliajn, paŝtistoj kaj instruistoj; 12 por perfektigo de la sanktuloj, por la laboro de pastrado, por la konstruo de la korpo de Kristo, 13 ĝis ni ĉiuj atingos la unuecon de la fido kaj de la scio de la Filo de Dio, ĝis la homo perfekta, ĝis la mezuro de la matureco de la pleneco de Kristo; 14 por ke ni jam ne estu infanoj, onde ĵetataj kaj ĉirkaŭpelataj de ĉiu vento de doktrino, per ĵonglado de homoj, per ruzo laŭ artifiko de trompo; 15 sed parolante la veron en amo, ni ĉiel kreskadu en tiun, kiu estas la kapo, Kristo, 16 el kiu la tuta korpo, kunigita kaj kunfortikigita tra ĉiu artiko de la livera sistemo, per energio, laŭ la mezuro de ĉiu parto, faras kreskadon de la korpo, por la sinedifado en amo.*

Karaj gefratoj, dum tiu-ĉi semajno vi aŭdis pri la unueco de la Eklezio, aŭ pli ĝuste pri la streboj atingi tiun ĉi unuecon.

Kiel diris Paŭlo al la Korintanoj, ĉu Kristo estas dividita? Mi same aldonas, ĉu la Eklezio estas dividita? Ĉu la korpo de Kristo estas dividita? Ĉu la jarcentoj dispecigis lian korpon? Ĉu vere la Eklezio ne restis unu, ĉar Kristo restis unu?

Ĉu Paŭlo en tiuj ĵus legitaj versikloj strebas al la unueco?

Fakte tie troviĝas du niveloj: tio, *kio estas*, kaj tio *kion faru* la gefratoj.

Mi listigos:

*Kio estas*: la voko kiun vi ricevis, la unueco de la Spirito en la ligilo de la paco, unu korpo, unu spirito, vi estas vokitaj en unu espero, unu Sinjoro, unu fido, unu bapto, unu Dio kaj Patro, ktp.

*Kion faru* la disĉiploj: iradi inde, agadu humile, milde, tolereme, paciencante en amo, penante konservi la unuecon.

Vi estas vokitaj. Tre grava punkto

por la kristanoj. Ne ili iniciatis la ekiron, ili estas vokitaj. Krome, kion signifas la vorto Eklezio, se ne la kuniĝo de la vokitoj? La ekesto de la Eklezio fontas en voko, en alvoko, en vokiĝo. Ĉu vi vere sentas vin vokitaj? Ĉar tiel vi estas.

Paŭlo ne hezitas. Vi estas vokitaj, vokitaj al irado. Vi ne estas vokitaj al stato sed al movo, al irado.

Li eĉ priskribas la iradon: humileco, mildeco, paciencon unu al la alia en amo. Ĉio ĉi tio ne aspektas unuavide kiel moviĝantaj kvalitoj. Oni ne dirus ke humileco estas mova kvalito, nek mildeco, nek toleremo, nek pacienco. Tiujn oni eĉ povus diri malhelpantajn la movon. Antaŭenpuŝanta estus pli tiu kiu malhumile agas. Same pri malmildulo, pri netoleranto, pri senpacienca aganto.

Kvankam, en multaj okazoj, tiuj



listigitaj kvalitoj helpas. Mi simple aludos pri la maniero konduki azenon. Kiam tiu ne plu volas antaŭeniri, ne utilas la krioj, la puŝoj, la streĉiĝoj, nur utilas la pacienco, la mildeco, eĉ la humileco antaŭ tiu stulta besto kiu rifuzas pluiri.

Ni ofte estante eklezio agas kiel tiu azeno, kiu ne volas iri en la ĝustan direkton, eĉ ne plu volas iri ien ajn. Tiam oni povas kompreni la alvokon de Paŭlo, ke ni iradu tiel humile, milde, tolereme kaj pacience.

Kaj tiajn kvalitojn, ni havu unu al la alia, en amo. Nia alvoko kiel eklezio, kiel vokitoj, estas ankaŭ laŭ la evangelia formulo: ni amu unu la alian.

Paŭlo aldonas ion alian: penante konservi la unuecon de la spirito en la ligilo de paco.

Por kompreni oni bezonas disigi la formulon.

Penante: tio estas: kun strebo, sed ankaŭ zorgeme, kun metodo, do ne kun streĉo kaj blokiĝo.

Konservi: oni konservas nur tion, kion oni jam havas. La unueco en la spirito jam estas donita, donacita de la graco de Dio.

Ni do alvenas al la dua temo de la teksto, post paroli pri la vokiĝo Paŭlo parolas pri la unueco. Li klarigas ĝin donante kelkajn ĝiajn aspektojn.

La verbo "estas" ne troviĝas en la originala teksto. Oni do povas legi tiujn "unu" kiel listo de karakterizoj de tiu unueco.

*Unu korpo*, tio klare indikas la eklezion, ankoraŭ menciata en la versikloj 12 kaj 16, korpo kies kapo estas Kristo mem.

*Unu spirito* povas aludi la Sanktan Spiriton, sed ankaŭ kiam oni legas la sekvajn versiklojn, povas paroli pri la etoso de la komunumoj, la konduto de la membroj kaj la rilatoj unu al la alia.

La aliaj "unu" estas al kio ni estas vokitaj, kiel eble modelo por tiu penado:

*Unu espero*: tiu espero kiu estas antaŭ ni kaj kiu certe estas komuna, sama, unu, ĝi estas: esti kun Kristo.

*Unu sinjoro*: Jesuo Kristo, neniu alia

*Unu fido*, en nia unu Sinjoro, kaj en neniu alia, fido en lia graco kaj amo

*Unu bapto* en la nomo de nia Sinjoro, kaj certe ne en la nomo de iu homo, de iu grupo

*Unu Dio*, kaj krome, tiu Dio estas Patro de ĉiuj, super ĉiuj, tra ĉiuj kaj en ĉiuj. Neniu povas alproprigi Lin. Neniu povas forpreni Lin de iu ajn alia.

Kaj ĝuste al ĉiu la graco estas donita, eĉ en la mezuro de la donaco de Kristo.

Ni do revenas al la principo de donaco. Tamen, tie oni precizigas ke estas donacite al pluraj diversajn donacojn. Kaj tio tute ne ligiĝas al iu ajn kvalito, pli certe al vokiĝo. Ĉar la aŭtoro de la epistolo mencias liston de tio, kion ni nomus hodiaŭ oficoj: apostoloj, profetoj, evangeliistoj, paŝtistoj kaj instruistoj.

Nia traduko indikas "por perfektigo de la sanktuloj", sed pli bone oni povus diri por ekipado de la sanktuloj, de la vokitoj, de la eklezio, por la verko de servado, tio estas diakonio, por la konstruo de la korpo de Kristo, de la eklezio.

Kaj la aŭtoro aldonas celojn, kialojn: ĝis ni atingos la unuecon, ĝis ni ĉiuj atingos la unuecon, la unuecon de la fido kaj de la scio de la filo de Dio, kaj ankaŭ ke ni kresku ĝis matureco por ke la korpo, la eklezio korpo de Kristo kresku kaj konstruiĝu en amo.

Tiam ni alvenas al paradokso.

La unueco estas ja donita, do efektiva, kaj samtempe ĝi estas konservenda, atingenda, ricevenda, kiel celo antaŭ ni.

Oni ĉi tie retrovas tion, kion priskribas la teologia formulo: jam ĉi tie kaj ankoraŭ ne.

Ni devas teni la du ŝnurojn de la paradokso.

La unueco de la eklezio estas karakterizo propra. Laŭ difino, ĝi estas jam unu. Pri tio ni devas persvadiĝi. Malgraŭ tio, kion ni sentas kaj vidas, la eklezio, korpo de Kristo estas unu.

Kaj ni devas peni, strebi, labori, por konservi tiun ĉi unuecon, por efektivigi ĝin, por ke la mondo kredu, vidante la amon inter ni.

Bedaŭrinde tiu ĉi amo ne tro videblas ĝenerale.

Sed, tio restas ankaŭ en la manoj de Dio. La konstruado de la korpo de Kristo, de la eklezio estas lia verko kaj dono. Ni lasu la Spiriton gvidi nin ĉiujn en tiu ofico, en tiu liturgio al Dio, antaŭvido de la eterna liturgio en la vera tabernaklo, en la nova Jerusalemo.

Tiu oficanta eklezio al kiu ni ĉiuj apartenas estas ja kaj jam unu, definitive, kaj samtempe ni devas zorgeme strebi por tiu unueco, por ĝia manifestiĝo.

Amen.

# Memorigo al la komenciĝo de la unua mondmilito

## Prelegeto okaze de la Ekumena Kongreso en Trento (IT) 2014

de Siegfried Krüger,DE

La temo ne nur estas por germano kaŭzo por retrorigardo nun jam al 2 mondmilitoj kun senlima sufero. Mi alkreskis en Berlino kaj la dua mondmilito faris el mi kaj el mia edzino duonorfojn. Sed mi scias ankaŭ pri la kulpo de la germanoj kaj ne rajtas sole plendi pri la detruo de germanaj urboj.

Vendredon, l-an de aŭgusto 2014 mi partoprenis en mia urbo edifon de la "Najlkruca komunumo" memore al la komenciĝo de la unua mondmilito 1914.

La germana aerarmeo en 1940 kaj 1941 bombadis la anglan urbon Coventry, kio kaŭzis 1236 mortintojn kaj 1746 vunditojn kaj 4330 detruitajn domojn. Ankaŭ la katedralo de Coventry estis detruita. El la ruinaj restaĵoj la dekano Richard Howard kunmetis el ĉarpentistaj najloj de la ligna konstruaĵo krucon sur la altaro. Sur ĥoreja muro li gravurigis la vortojn "Patro pardonu" kaj kontraŭstaris la tenton aldoni "ilin". Tiu penso verŝajne estis bazo por la kreado de "Najlkrucaj komunumoj" kun mondvaste nun pli ol 200 kaj en Germanio 59.

Ankaŭ mia urbo Heilbronn ek de 2009 apartenas al la komunumo. La urbo en 1944 pere de 250 aviadiloj de "Royal Air Force" estis preskaŭ tute detruita, kio kaŭzis pli ol 7000 mortintojn nur duonan jaron antaŭ la fino de la milito. La unua Najlkruca komunumo en Germanio 1947 estis la urbo Kiel.

La repacigan preĝon oni formulis en 1959, nun en 10 lingvoj. Mondvaste ĉiun vendredon je 12-a ĥoro la preĝo estas celebrata.

Post la solenaĵo en Heilbronn mi volis traduki la litanion en Esperanton. Estis pastro Albrecht Kronenberger, kiu atentigis min, ke ĝi jam en la jaro 2001 estis enmetita en ADORU sub la numero 867.

Coventry bombita



### Postprelegaj rimarkoj

Por la kongresanoj ekster Germanio la "Najlkrucaj komunumoj" preskaŭ ne estis konataj. Ni kongresis en Trento (Cadine) en la eklezia centro Mariapoli "Chiara Lubich". Ŝi fondis kaj estis unua prezidantino de "Movado de Fajrujoj" (Focolari). Tiu ĉi movado havas kiel celon la interpopolan unuiĝon, la universalan fratecon.

Por la kongresanoj ekster Italio la

movado ne estis konata (!). Ni ekskursis al Rovereto kaj konatiĝis kun urbo kun ekstraordinara milita memorejo. La surmonta sonorilego “Maria Dolens“ estas nun la kvara plej granda en la mondo kaj sonorilas ĉiun vesperon je 21.30 h.

Preĝo de la Najlkruca Komunumo

*Ĉiopova Dio, per la vivo, morto kaj releviĝo de Via filo Jesuo Kristo vi donis al mi la servon de repaciĝo por pardono kaj amo.*

*Donu al ni la fidon al via saniga forto, por kiu la kruco de via filo estas eterna signo. Benu en la nomo de Jesuo nian komunumon en la tuta mondo kaj kapabligu ĉiujn membrojn esti atestantoj de Via pardono kaj amo.*

*Komunigu nin en la penada servo al Via celo, ĉion ordigi kaj sanigi, kaj fortigi nin en la ekkono, ke ni estas Viaj disĉiploj, se ni ekzercas nin en komuna amo.*
*Tion ni petas per Jesuo Kristo, nia Sinjoro.*
*Amen*



Najlkruco 1947 por Kiel

## Kulpokonfeso de Stuttgart

La *Konsilantaro de la protestanta eklezio en Germanio* en sia kunsido la 18-an/19-an de oktobro 1945 en Stuttgart, bonvenigas reprezentantojn de la *Ekumena konsilantaro de eklezioj*. “Ni estas dankaj pro tiu vizito tiom pli, ĉar ligas nin kun nia popolo ne nur granda komuneco de la suferoj, sed ankaŭ solidareco de kulpo.

Kun granda doloro ni diras: Fare de ni estis alportita senfina sufero super multaj popoloj kaj landoj. Kion ni ofte atestis en niaj paroĥoj, tion ni nun elparolas nome de la tuta eklezio: Dum multaj jaroj ni batalis nome de Jesuo Kristo kontraŭ tiu spirito, kiu en la nacisocialisma reĝimo de perforto trovis sian teruran esprimon; sed ni akuzas nin, ke ni ne konfesis pli kuraĝe, ne preĝis pli fidele, ne kredis pli gaje kaj ne amis pli arde.

# Batante Jesuon

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Aperis en Dia Regno, la eldono numero kvar el 2013, mia artikolo: “La Ges-roj Wurmbrand, modernaj geherooj de la Fido”. Rikardo Wurmbrand estis juda ateisto el Rumanio kiu konvertiĝis al Kristo dum la jaroj '30. Li kaj lia edzino, Sabina, establis malgrandan evangelian preĝejanaron. Pastro Wurmbrand kaj la anoj el la preĝejanaro evangelizis la soldatojn el la Ruĝa Armeo kiuj invadis Rumanion dum la Dua Mondmilito. Post la milito, Pastro Wurmbrand estis arestita kaj suferis terurajn torturojn dum la 14 jaroj kiujn li pasigis en komunistaj malliberejoj. Post kiam li povis foriri al la okcidento kun sia familio, li establis la organizaĵon “Kristo al la Komunista Mondo”. Kiam rompiĝis la Sovetunio, la organizaĵo ŝanĝis sian nomon al “Voĉo de la Martiroj”.

Sed la celo de tiu organizaĵo estas sama: publikigi la persekutojn kiujn kristanoj suferas en multaj landoj, kaj monhelpi kristanojn kiuj estas perdintaj ĉiujn siajn posedaĵojn pro atakoj de popolaĉoj, kaj la familianojn de pastroj kiuj estas enkarcerigitaj aŭ mortigitaj. Voĉo de la Martiroj ankaŭ provizas medicinan kaj kirurgian helpon por kristanoj kiuj estas vunditaj pro atakoj de popolaĉoj.

Mi ĉerpis la sekvantan informon el la revuo de la Voĉo de la Martiroj (kun la sama nomo), la eldono el novembro de 2013. La nomoj de la personoj menciitaj estas ŝanĝitaj por ŝirmi ilin kontraŭ atakoj de la aŭtoritatoj en ilia lando.

Kiam “Ŝahnaz” fariĝis kristanino antaŭ tri jaroj, ŝia patro “Ebi” pensis (kaj esperis) ke ŝi nur trapasas alian fazon. Ebi, pia islamano kaj oficisto el la irana registaro, estis observinta ŝin sekvi diversajn islamajn profetojn kaj okcidentajn muzikajn stelulojn. Certe ĉi tiu “Jesuo-fazo” forpasos kiel la aliaj. Sed la “Jesuo-fazo” ne forpasis, kaj la fido de Ŝahnaz pli fortiĝis. Ŝi atestis al aliaj homoj pri Kristo kaj ŝi komencis gvidi malgrandan grupon kiu studas la Biblion.

La gepatroj de Ŝahnaz faris planon por allogi denove sian filinon al la islama religio. Antaŭ ol Ŝahnaz komencis sekvi Jesuon, ŝi estis enamigita de juna viro kiu loĝas proksime. Je tiu tempo, la gepatroj de Ŝahnaz rifuzis doni permeson ke ŝi edziniĝu al li. Sed nun ili esperas ke li helpos ŝin forgesi sian amon por Jesuo.

Ili invitis la junan viron kaj liajn gepatrojn al sia hejmo por diskuti la eblecon de la geedzeco de la gejunuloj. Post kiam la du familioj parolis dum iu tempo, Ebi gvidis Ŝahnaz-on al alia ĉambro de la domo kaj demandis ŝin

kion ŝi opinias pri la ebla geedzeco.

"Mi bedaŭras, patro, sed mi nun estas kristanino kaj mi ne povas edziniĝi kun islama viro," ŝi respondis al li. "Nun mia celo estas malsama. Mia celo estas servi Dion." Tiam ŝi denove instigis sian patron ke li akceptu Kriston.

Kiam la gepatroj de la juna viro komprenis ke Ŝahnaz estis rifuzinta ilian filon, ili kolere foriris el la domo. La gepatroj de Ŝahnaz hontiĝis. Tre kolerega, Ebi demetis la zonrimenon kaj komencis bati sian filinon. "Ĉu vi komprenas," li kriegis, "ke mi povas mortigi vin nuntempe kaj tio estas laŭleĝa? Vi estas islamanino kiu fariĝis kristanino. Vi estas apostato! Pro vi, mia reputacio estas ruinigita. Mi daŭrigas bati vin por ke vi genuiĝu kaj forkonfesu la kristanismon kaj revenu al Islamo."

"Sinjoro," Ŝahnaz alvokis, "mi ne deziras forkonfesi mian fidon. Jesuo, helpu min!" Subite la batado ŝanĝiĝis. Anstataŭ bati sian filinon, Ebi komencis bati sin mem per sia propra zono. Lia voĉo ŝanĝiĝis. "Mi estas malbona homo," li diris. "Mi estas tre malpura. Mi estas tre stulta. Mi batalas kontraŭ Dio!" Li komencis alvoki Dion, ke Dio pardonu lin. Fine li falis al la planko ŝajne sveninta.

Je tiu momento, la patrino de Ŝahnaz eniris en la ĉambron. "Kion vi faris al via patro?" ŝi kriegis. "Ĉu vi mortigis lin?" "Li preskaŭ mortigis MIN," Ŝahnaz respondis. "Mi ne scias kio okazis." Ŝahnaz kaj ŝia patrino preskaŭ vokis ambulancon, sed Ebi diris ke li ne bezonas ĝin. Li ĉirkaŭpremis sian filinon. "Pardonu min, mi petas," li diris. "Petu al via Jesuo ke Li pardonu min. Mi nun komprenas kontraŭ Kiu mi batalas."

Ebi rakontis al Ŝahnaz kiel Dio

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

### 23. septembro

Kompatema Dio, mi laŭdas Vian fidelecon, per kiu Vi senĉese amas min. Pardonu al mi mian indiferencon kaj malvarmecon. Renovigu la ligon kun mi. Faru min sincera kaj firmvola.




Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74).
Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

malfermis liajn okulojn al la vero. Dum li batis ŝin, li havis vizion de Jesuo. Jesuo ĉirkaŭpremis Ŝahnaz-on per Sia maldekstra brako kaj per Sia dekstra brako Li signis ke Ebi haltu svingi la zonon. "Ne batu ŝin," Jesuo diris al li. "Ŝi apartenas al Mi." Ebi komprenis ke kiam li svingis la zonon, li vere batis Jesuon.

Ŝahnaz pardonis sian patron. "Eĉ Jesuo diris, 'pardonu ilin ĉar ili ne komprenas tion kion ili faras'," ŝi diris al li. Ebi fariĝis kristano, kaj nuntempe li gastigas preĝejanaron kiu kunvenas en lia hejmo. Li tute kuraĝigas kaj subtenas sian filinon dum ŝi daŭrigas sian pastrecon.

La Apostolo Paŭlo, antaŭ ol li konvertiĝis al Kristo, nomiĝis Saŭlo. Li estis terura persekutanto de la Eklezio, eĉ mortigante multajn kredantojn. Survoje al Damasko por daŭrigi la persekuton, "subite ekbrulegis ĉirkaŭ li lumo el la ĉielo; kaj li falis sur la teron, kaj aŭdis voĉon dirantan al li: Saŭlo, Saŭlo, kial vi min persekutas? Kaj li diris: Kiu Vi estas, Ho Sinjoro? Kaj tiu diris: MI ESTAS JESUO kiun vi persekutas." (La Agoj, ĉapitro 9, versoj 3-5)

Tiuj homoj kiuj persekutas kristanojn hodiaŭ, ankaŭ persekutas Jesuon. Ili havas alternativon: humiliĝi kaj penti, aŭ stari antaŭ Jesuo je la Tago de Juĝo por ricevi eternan kondamnon.

Oni aŭ apartenas al Jesuo Kristo aŭ li/ŝi apartenas al Satano. Ne ekzistas meza loko inter la du. Ni devas certiĝi ke ni apartenas al Jesuo.

# Reago de leganto

En DR 1-2014 frontpaĝe staras la vorto "karesmo". Mi mem uzas ĉiam la zamenhofan esprimon: granda fasto. La japanoj devas daŭre ekstre lerni novajn vortojn en Esperanto. La kompatindulojn.

Kore, Ed

Respondo de la redaktoro:

La vorton karesmo mi uzis ĉar influis min Eva Farkas kiu uzas la vorton karesmo. Antaŭe mi ĉiam uzis fasto-n ĉar pli facile lerni por svedoj. Sed iel mi sentas ke karesmo estas pli "religia", do pli taŭga por DR kaj pli interes-veka/ekzotika sur fronta paĝo precipe kune kun la fragmento de la malnova kanteto.

Ne nur la orientanoj estas kompatinduloj. Ankaŭ mi devis lerni tiun vorton ĉar ne estas en mia origina vorttrezoro. Sed jes, cetere mi sam-opinias kun vi (ĉar tiel mi ankaŭ komprenis vian komenton) ke ni ofte nenecese kaj senkaŭze grandigas la vortaron nur ĉar iu persono preferas alian vortradikon. Tiel ni malfaciligas por la plej multaj esperantistoj bone regi la lingvon.

Mi dankas vin pro via demando kaj estonte mi provos esti pli singarda.

Kore, la redaktoro

# Kongresa raporto

## De la ekumena kongreso en Cadine, Trento

Raportis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU
Fotis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS kaj Vaclav POSPÍŠIL



Ĉijare ni estis invititaj al la 20a Ekumena Kongreso al belega itala vilaĝo, Cadine, kiu situas apud la fama urbo, Trento, la urbo de la tridenta/trenta koncilio en la jaroj 1545-1563.

La moderna kaj komforta religia centro estis konstruita por ekumenaj agadoj kaj kunestadoj, kaj ankaŭ la belega natura ĉirkaŭaĵo inspiris la bonan kaj fruktodonan etoson.



Ĉiumatene okazis Sankta Meso en la kapelo kaj poste ekumena preĝo en la granda salono. Estis eldonita kajero pri kaj al tiuj preĝoj.

Post la matenmanĝoj ni komune kantis per la afabla helpo kaj gvidado de Stefan LEPPING (DE). Ofte akompanis violone Agneta JÄRLSTRÖM (SE).



**Sabate** post mallonga aŭ longa vojaĝo ĉiuj partoprenantoj en ordo alvenis. Post la vespermanĝo ni iom interkonatiĝis, malkovris, ke la sepdek partoprenantoj venis el 15 landoj. Poste Albrecht KRONENBERGER (DE) gvidis la vesperan preĝon.



**Dimanĉe** okazis la solena malfermo de nia kongreso. La prezidanto de IKUE, sinjoro Giovanni DAMINELLI (IT) kaj la prezidanto de KELI, Philippe COUSSON (FR) kore

salutis la partoprenantojn.

La Movado de la Fajrujoj (itale Movimento dei Focolari) gastigis nin. Gvidantoj de la loka movado kaj de la domo, sinjorino Annalisa PACCHETTI kaj sinjoro Roberto LAGO prezentis al ni la movadon kaj la fondintinon Chiara LUBICH, kaj la historion de la konstruado de tiu ĉi hejmo.

La ekumenan diservon poste gvidis Bernhard EICHKORN (DE) kaj Wolfram ROHLOFF (DE), legis tekston ankaŭ Philippe COUSSON kaj Václav POSPÍSIL (CZ).



Philippe COUSSON

Post la tagmanĝo faris malferman prelegon Philippe COUSSON pri la kongresa temo: *Ĉu Kristo estas dividita?* Lian prelegon ni povas legi en venonta Dia Regno.

Sekvis la prelego de Marija BELOŠEVIČ (HR) pri la dua vatikana koncilio.

Posttagmeze ambaŭ organizoj havis estrarkunsidon, kaj post la vespermanĝo Marija BELOŠEVIČ montris bildojn kaj rakontis pri la Universala Kongreso en Buenos Aires.


Marija BELOŠEVIČ

La vesperpreĝon en tiu ĉi vespero faris Philippe COUSSON.

**Lunde** vizitis kaj salutis nin la ĉefepiskopo de Trento, sinjoro Luigi BRESSAN. Simpatie kaj modeste li rakontis pri sia vivo kaj plur-jardeka laboro en la tuta mondo je la diplomatia agado de Vatikano. Kun ĝojo li akceptis ADORU, kiun ni donacis al li, kaj ni kune kantis la himnon de Beethoven (nr. 597).



Poste okazis du prelegoj pri la koncilio en Trento.




Unue sinjoro Giovanni DAMINELLI parolis pri la koncilio de Trento laŭ historia perspektivo, poste sinjorino Norma CESCOTTI (IT) pri la ĉiutaga vivo en Trento dum la tempo de la koncilio.

Per la afabla permeso de la prelegantoj ambaŭ prelegojn vi povos legi en iu sekva numero de Dia Regno.

Posttagmeze ni ekskursis al la vilaĝo Rovereto, kie

troviĝas grandioza sonorilego, kiu estis farita post la unua mondmilito. La sonorilego estis farita el 19 pafilegoj, kiuj estis uzitaj dum la mondmilito kaj la partoprenintaj nacioj sendis ilin, esprimante la esperon pri la ĉiama estonta paco.

(La foton vi vidas sur la fronta paĝo)

Ni ankaŭ vizitis ortodoksan preĝejon en Borgo Sacco.

Dum tiu ĉi kaj ankaŭ dum la postaj ekskursoj akompanis nin la gvidanto de la Ekumena Centro de Trento, sinjoro Alessandro MARINELLI.

Vespere Miloš ŠVÁČEK (CZ) montris bildojn pri la Bibliaj Tagoj en 2014 en Tuchoměřice kaj en 2012 en Trento. Por nia bonega amuziĝo, li ankaŭ filmis tie ŝercegan rakonton de Carlo SARANDREA (IT), kiun li povis "vive" persone daŭrigi.

La vesperajn preĝojn de lundo ĝis vendredo faris sinjorino Eva FARKAS-TATÁR (HU) "heredigante" al la partoprenantoj gravajn travivaĵojn kaj spertojn de sia longa kaj Di-benata vivo, kaj ankaŭ tion, kion ŝi lernis per tiuj travivaĵoj kaj spertoj. Vi povos legi tiujn kvin preĝojn, prelegojn redaktite en Dia Regno estonte.

**Marde** antaŭ la jarkunsidoj Philippe COUSSON prezentis la eblan kaj de KELI proponitan lokon de la sekvontjara, denove ekumena kongreso, en Strasburgo.

La protokolon pri la jarkunsido de KELI vi povos legi en la nuna numero de Dia Regno. Ambaŭ jarkunvenoj akceptis la proponon pri nia renkontiĝo en la jaro 2015 el Francio, Strasburgo!









La jarkunsido

Posttagmeze ni ekskursis al la Sanktejo de Sankta Romedio.

Vespere ni havis eblecon ĝui la dancan spektaklon de loka grupo “Brainstorm”.

**Merkrede** okazis nia tuttaga ekskurso al la urbo Merano. Ni vizitis la Sinagogon kaj ĝian muzeon, poste la Luteranan preĝejon. Post luksa tagmanĝo ni promenis al la urba centro, aŭskultis la historion de la urbo kaj rigardis ankaŭ la Katedralon de Sankta Nicoló.

Vespere ni aŭskultis la brilan koncerton de la ensemblo “Il Tamburo del Sole”, kiuj elstare ludis “klezmer” muzikon.

**Ĵaŭde** post la “kutimaj” matenaj programeroj (Sankta Meso, ekumena preĝo, matenmanĝo kaj komuna kantado) ni aŭskultis la prelegon de Stefan LEPPING pri la generisma ideologio kaj poste la prelegon de Paola GIOMMONI (IT) pri kristanaj simboloj kaj pri la gemonaĥejo de Bose.

Posttagmeze ni vizitis la Ekumenan Centron de Trento. Ni aŭskultis raporton pri ilia grava laboro de Alessandro MARTINELLI. Ni ankaŭ dankis lian ĉarman kaj tutsemajnan kunestadon kaj ankaŭ la financan helpon de la Centro al nia kongreso. Per la helpo de la donacita ADORU li povis kune kanti kun ni.

Ni vizitis la Katedralon kaj la preĝejon de Sankta Maria Maĵora.

Poste en la preĝejo de Sankta Laŭrenco okazis ekumena diservo kun










# FOTOGALERIO



Gabriella STIER kaj Oldřich FISCHER



Ágnes RACZKEVY-EÖTVÖS kaj Petr CHRDLE



Bernahard EICHKORN



Sieglinde STAMM



Mats kaj Anna LANDFORS



La fotisto Václav POSPÍŠIL




Wolfram ROHLOFF



Wolfram ROHLOFF kaj Siegfried KRÜGER



Albrecht KRONENBERGER



Eva FARKAS,
Petr CHRDLE
Ruth v PUJENBROOK



sankta manĝo. La diservon celebris Philippe COUSSON kaj Wolfram ROHLOFF. La monkolektadon ni ofertis al la laboro kiun Jaques Tuinder (NL) komencis kaj pri kiu Siegfried Krüger diris kelkajn vortojn al la partoprenantoj. Kolektiĝis 345 eŭroj.

Vespere Marija BELOŠEVIČ montris interesajn kaj atentmeritajn kristanajn esperantajn retpaĝojn.





Petr Chrdle

**Vendrede** antaŭtagmeze ni aŭskultis tri prelegojn.

Petr Chrdle (CZ) prelegis pri la vivo de Přemysl PITTER, "La apostolo de amo", pri kiu li eldonis interesan libron esperantlingve.

Stefan LEPPING parolis kun la titolo "Disiĝoj kaj paciĝoj" (tiun prelegon vi povos legi en unu el la sekvontaj Dia Regno).



Stefan Lepping





Siegfried KRÜGER memorigis nin pri la centjara datreveno de la komenco de la unua mondmilito.

Post la libera kaj ripoziga posttagmezo ni ĝuis varian kaj vere amuzan adiaŭan vesperon, kiun organizis kaj lerte gvidis Paola GIOMMONI.

Ni ankaŭ dankis al la Loka Kongresa Komitato: sinjoro Giovanni DAMINELLI, sinjorino Norma CESCOTTI kaj monaĥo Pierluigi SVALDI (IT) ilian zorgeman kaj sinoferan laboron.



Post la kortuŝa kaj saĝa vespera preĝo en la nomo de ni ĉiuj Pavel POLNICKÝ (CZ) dankis al Eva FARKAS-TATÁR ŝian tutsemajnan laboron pri la vesperaj preĝoj kaj ankaŭ gratulis al ŝi pro ŝia baldaŭa 90-jara naskiĝtago.

**Sabete** matene je la 10-a okazis la oficiala fermo de nia ĉijara kongreso, kiu donis vere belajn travivaĵojn kaj ankaŭ gravajn pensojn pri kiuj ni povas hejme daŭre "labori". ☙





# 20-a Ekumena Esperanto-Kongreso

## Protokolo de la jarkunveno de KELI

TRENTO, Italio 19. 8. 2014

Partoprenis 22 membroj el 10 landoj (laŭ listo de partoprenantoj), inter ili estraranoj: Philippe Cousson, Pavel Polnický, Agnes Ráczkevy-Eötvös, Siegfried Krüger kaj Václav Pospíšil.

1. Malfermo – prezidanto Philippe Cousson

2. Laŭ estrarpropono estis elektitaj kunprotokolantoj S. Stamm kaj O.A. Fischer

3. Akceptita la proponita programo

4. Komunikoj – estis transdonitaj salutoj de la membroj, kiuj ne povis partopreni el Nederlando, Svislando, Hungario, Rumanio kaj Svedio

5. Per unuminuta silento ni rememoris la mortintojn: Å. Ahlren, L. Sundman, E. Persson, I. Norfolk, C. L. Dekker, K. Ekman, H. Stroinski kaj B. Leonov.

6. La sekretaria raporto estis tre konciza, ĉar la agado de la landaj sekcioj ne estas tro granda... diservoj okazis dum la brita, skota, germana kaj sveda kongresoj. Dum la UK en Bona Aero okazis kunveno de IKUE+KELI (gvidis M. Beloševič). Korespondado estas plej ofte per retaj mesaĝoj, nur escepte venas papera letero. P. Polnický daŭre prizorgas presadon kaj dissendadon de DIA REGNO kaj ni povas fieri, ke ĝi aperas regule. Post la pasintjara kontrolo ni presas 310 ekzemplerojn sendataj al 35 landoj. Estraro kunvenas ĉiumonate per skajpo. S. Krüger informis pri la jarkunveno de la germana sekcio, A. Kronenberger pri la diservo dum la germana kongreso kaj pri la Bibliaj tagoj en Tuchoměřice (CZ) kaj M. Landfors pri ekumena diservo dum la sveda kongreso. La sekretario petas ĉiujn, informi lin pri lokaj aktivadoj de kelianoj.

7. Á. Ráczkevy-Eötvös klarigis la kasistan raporton, publikigitan en DR 3/14 kaj respondis demandojn.

8. K. H. Schaeffer legis la raporton pri la kaskontrolo, kiun li faris kun N. Südland kaj konstatas, ke ĉio estas en ordo (aldonita al protokolo). Kaskontrolantoj pretas daŭrigi laboron kaj estis unuanime reelektitaj.

9. Diskuto: A. Kronenberger demandis pri altigo de elspezoj de DR, sekretario klarigis, ke estas unua altigo de la presprezo, kvankam ĉiuj elspezoj de presejo altiĝas regule (elektro, gaso, papero ktp.) La raportoj de sekretario, kasistino kaj kaskontrolantoj estis aprobitaj.

10. Buĝetoj – en DR 3/14 estis rezultoj de 2013 kaj proponoj por 2014 + 2015 kasistino donis kelkajn klarigojn kaj poste estis aprobitaj.

11. La raporton de la redaktoro B. O. Åradsson (li ne povis partopreni) legis Ágnes kaj ĝi estis ĝoje akceptita. Speciala peto estis danki al frato A. Kronenberger kaj s-ro Urban por ebligo publikigi DR en la retaj paĝoj de Kristanaj fontoj.

12. Estrarelekto – ĉi-jare finiĝas 3-jara periodo de Á. Ráczkevy-Eötvös, S. Krüger, P. Polnický kaj V. Pospíšil, ĉiuj estis tuj reelektitaj.

13. Kongresplanoj: Prezidanto informis pri ebleco organizi ekumenan kongreson en venonta jaro 2015 en la franca urbo Strasburgo. Post diskuto – Ágnes postulis, ke ni pensu pri la programo, niaj kongresoj ne estu turismaj aranĝoj. Poste 18 kelianoj akceptis tiun proponon. (Fine de la kongreso ni ricevis informon, ke ankaŭ IKUE akceptis tiun proponon, do estos ekumena kongreso organizota de KELI). En la jaro 2016 okazos UK en Nitra (Slovakio) kaj la estraro akceptis la proponon de la sekretario, organizi KELI kongreson en Bratislava (Slovakio). IKUE verŝajne kongresos en Trnava (Slovakio). Por la jaro 2017 oni pensas pri Wittenberg (Germanio).

14. Proponoj kaj sugestoj de la membroj. Ágnes bedaŭras, ke la nombro de la aktivaj kongresanoj malaltiĝas. Ŝi alvokas kelianojn pripensi sian kontribuon al la programo kaj ne resti nur "turistoj".

15. Fermo de la jarkunveno – prezidanto P. Cousson.

Protokolis Pavel Polnický,
kunprotokolis S. Stamm kaj O. A. Fischer

# Klostro Kirchberg

## Ekumena renkontiĝo

Siegfried KRÜGER, DE

Kara redaktoro kaj legantoj, la aldonita foto montras la ekumenan grupon, kiu estis en la protestanta klostro Kirchberg inter la 4.8.–7.8.2014.

De maldekstre vi vidas: Ernst Leuze, Anton Kiefer, Alois Eder, Grete Burkhardt, Bernhard Eichkorn, Hedwig Schaeffer, Siegfried Krüger, Albrecht Kronenberger kaj Karl Heinz Schaeffer.

Temis pri ADORU kaj la kantoj, kiuj estis prilaboritaj okaze de kelkaj renkontiĝoj en Kirchberg.

Rigardu sub paĝo 1401 en ADORU, tie vi trovos liston de la 53 kantoj kiujn oni prilaboris en klostro Kirchberg. Grandparte ni kantis ilin akompanata piane de Ernst Leuze.

Albrecht Kronenberger flegas la stokon en ADORU kaj ni ankaŭ poluris kelkajn himnojn de Hans Amund Rosbach.

Tre kore salutas
Siegfried



# Informetoj



Sabate 26. 7. 2014 okazis en la baneja urbo Poděbrady ekumena diservo, organizita okaze de la 550-a datreveno de la porpacaj iniciativoj de la ĉeĥa reĝo Georgo el Poděbrady. Sur la herbeja bordo de la rivero Elbo renkontiĝis 9 reprezentantoj de diversaj eklezioj kaj pli ol 200 partoprenantoj.

Nekutime kaj certe interese estas, ke la diservon iniciatis la urbestro de Poděbrady...

P. Polnický

---

## Els van Dijk — Honora Kunlaboranto de IEI



La 12-an de septembro 2014 okazis bankedo en Utrecht, Nederlando, dum kiu Els van Dijk fariĝis Honora Kunlaboranto de Internacia Esperanto-Instituto. Ĉeestis kvin personoj: Els, la prezidanto de IEI Ed Borsboom, kasisto Piet Buijnsters kaj la IEI-helpantoj Ineke van Iperen kaj Adrie den Haan.

La prezidanto skizis la Esperanto-vivon de Els. Tio komenciĝis en 1967, kiam ŝi eklernis la lingvon ĉe la familio Koopmans kaj membriĝis al KELI. De tiu organizo ŝi fariĝis en 1981 sekretario kaj restis ĝis 2011. Ankaŭ en la nederlanda Esperanto-movado Els aktivis kaj inter 1999-2007 funkciis kiel estrarano de sia landa unuiĝo. Ekde 2007 Els transprenis la superrigardon de la mastrumado en la oficeja IEI-domo en Hago. Krome gvidis la gazetan arĥivon en la Instituto.

Sekve de la distingo Els ricevis la specialan festdiplomon kaj la IEI-medalon el arĝento. Ekde 1976, kiam Andreo Cseh nomumis la unuan personon, Stöp Bowitz el Norvegio, ĝis nun sep viroj kaj ses virinoj eniris la vicon de honoratoj. Koran gratulon al nia KELI-ano Els van Dijk.

Ed Borsboom



# Nekrologoj

**Elly Persson** naskiĝis en Nederlando la 25-an de aŭgusto 1925. Ŝi frue ekinteresiĝis pri Esperanto kaj fariĝis anino de la nederlanda esperantomovado. Poste ŝi translokiĝis al Svedio, kie ŝi edziniĝis. Ŝi iĝis anino de Sveda Esperantofederacio (SEF) kaj KELI. Ŝi partoprenis inter alie la Internacian KELI-kongreson en Jönköping en la jaro 1991, kie ŝi servis kiel lerta interpretistino dum ekskurso al la malsanulejo Ryhov. Ŝi lastfoje partoprenis la esperantokongreson en la jaro 2003. Ŝi mortis la 24-an de julio 2014. La entombigo okazis en Trelleborg la 30-an de julio. Ĉe multaj KELI-anoj kaj SEF-anoj ŝi restos en bona memoro. Ŝi ripozu en paco!

**Lennart Sundman** naskiĝis la 6-an de aprilo 1917 en Västerås. Li lernis Esperanton dank' al kurso de koresponda instituto. Profesie li fariĝis muzikisto kaj muzikinstruisto. Li estis orgenisto kaj ĥorgvidanto en Ansgarskyrkan en Västerås, eklezio kiu apartenas al la Sveda Misia Federacio. Li ankaŭ kelkfoje ludis pianon aŭ orgenon dum diversaj KELI-kunvenoj. Lennart Sundman mortis la 11-an de julio 2014. Li certe restos en bona memoro ĉe multaj geesperantistoj.

Li ripozu en paco!

**Inga Nothfalk** naskiĝis la 6-an de aŭgusto 1915. Ŝi fariĝis instruistino kaj translokiĝis al Hässelby apud Stokholmo, kie ŝi laboris ĝis sia pensiiĝo. Kiel 50-jarulino ŝi komencis lerni Esperanton. Ŝia instruisto estis Vilhelm Gran, kiu instigis ŝin fariĝi membrino de KELI, kie ŝi estis aktiva en la Stokholma grupo. Ŝi apartenis al la Evangelia Libera Eklezio. Ŝi ankaŭ multe interesiĝis pri la Hernhuta movado. Inga Nothfalk mortis la 1-an de junio 2014. Ĉe multaj el ni ŝi restos en bona memoro. Ŝi ripozu en paco.

*Arne Lundkvist*

# Boĵidar Leonov

## 16 junio 1941 — 24 julio 2014

La 24an de julio 2014 post longa malsanado forpasis nia elstara esperantisto profesoro Boĵidar Leonov.

Li estis naskita la 16an de junio 1941 en Karlovo. Li fariĝis inĝeniero pri maŝinoj en la Teknika Universitato en Sofio kaj poste specialiĝis pri patentoj kaj internacia juro. Li eldonis multajn fakajn librojn kaj en 1990 li fariĝis profesoro pri Patentoj kaj Internacia Juro.

Jam en 1968 li estis elektita Prezidanto de STELO (Studenta Tutmonda E-Ligo). Ĝis sia morto li estis prezidanto de TOLE (Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista). Prof. Boĵidar Leonov estis prezidanto de BEA en la periodo de 2010-2013 kaj poste li estis elektita honora prezidanto de BEA. Li estis multjara E-aganto, laborema, senlaca kaj aktiva esperantisto, konata ne nur en Bulgario, sed en la tuta mondo. Li estis iniciatinto kaj organizanto de unikaj Simpozioj por Apliko de Esperanto en Profesia Agado (AEPA), kiujn partoprenis tiel fakuloj-esperantistoj, kiel same fakuloj neesperantistoj el multaj sciencaj fakoj kun samtempa tradukado en kaj el Esperanto. Tuj post ili okazadis ankaŭ Religiaj Seminarioj "Religio kaj Esperanto". La internaciaj simpozioj kaj la seminarioj okazadis ĉiujare en junio en Karlovo kun kreskanta intereso kaj sukceso. La Simpozioj AEPA por la unua fojo en la mondo enkondukis Esperanton en la sciencon por neesperantistoj kaj lia laboro estis rekonita de la Vicprezidento de Respubliko Bulgario Margarita Popova, kaj li estis distingita per speciala diplomo de la Prezidentejo.

Li estis same refondinto de la Internaciaj Festivaloj de E-Parolo kaj Kanto, kiuj okazas ĉiuprintempe en la komenco de aprilo. En la jaro kuranta 2014 li estis fondinto kaj fariĝis prezidanto de EDE-Sekcio en Bulgario.

En sia 73-jara vivo prof. Boĵidar Leonov gvidis multajn E-kursojn. Li estis ankaŭ prezidanto de la E-Societo en Karlovo. Lia senlaca kaj persista E-aktivado estis multflanka kaj varia en la sferoj de: kristanismo ortodoksa, patentoj kaj internacia juro, turismo ekologia, instruado kaj aliaj. Li fondis Internacian E-Universitaton en Karlovo sub la aŭspicio de AIS (Asocio Internacia de Sciencoj) en San Marino kaj ĝis la fino de sia vivo li estis ties Rektoro.

La morto de prof. Boĵidar Leonov estas grava perdo por la tutmonda E-Movado. Ĉiuj, kiuj konis profesoron Boĵidar Leonov profunde kondolencas al liaj familianoj, amikoj kaj samideanoj. Ili eterne gardos en sia memoro koran senton pri tiu sindonema kaj abnegacia esperantisto kaj aktiva E-aganto.

***Nikola Uzunov***



Fotis: Petr Chrdle dum prelego dum KAEST 2004 en Dobřichovice, CZ

# En la komenc' de ĉi tiu nova tag'

(originale verkita)




EN LA KOMENC' DE ĈI TIU NOVA TAG' • M kaj E (originale verkita):
Albrecht Kronenberger 2014-06-19

*La instigon por la melodio mi ricevis la 6an de junio 2014, kun Bernhard Eichkorn kaj Anton Kiefer survoje al la germana kongreso en Erfurto. Kiam en la unua aŭtoŝosea restoracio en Turingio buspleno da homoj ekstaris, iliaj seĝoj bruis muzike similsone. Inter la seĝoj estis diferenco de ĉirkaŭ duonduto. El tio estiĝis la unua linio de ĉi tiu melodio.*